Año XI (N.° 114) Depósito Legal V. 309-1959

Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 2

MARZO ABRIL 1959

Marqués de Caro, 6
VALENCIA
(ESPAÑA)

EL ESPERANTO Y «LAS ARMAS Y LAS LETRAS»

Hay quien opina, que el problema lingüístico mundial es un callejón sin salida y que su solución hay que dejarla en manos del idioma de quien posea la mayor fuerza militar en cada época. Hubo un tiempo, en que la supremacía fué del idioma griego, después vino el latín y así, sucesivamente, la cosa fué cambiando de mano, hasta llegarle el turno al español, luego al francés y ahora al inglés, siempre bajo los mismos auspicios del famoso discurso de «Las Armas y las Letras», que el gran Cervantes puso en boca de Don Quijote.

Dominar un idioma cualquiera, con la perfeccicn de un nativo, es casi imposible, cosa que ignoran la mayoría de los que —más o menos sugestionados— inician unos estudios pensando, que a la terminación de los mismos (si es que alguna vez se termina de aprender un idioma) podrán ir a París o Londres, como si hubieran vivido siempre allí.

La realidad entonces se encarga de demostrarles lo equivocados que estaban al respecto.

Normalmente, cuando se cree, por ejemplo, dominar el francés —idioma este, que muchos consideran fácil para los latinos— y se va a Francia, observa en primer lugar, con la consiguiente desilusión, que no entiende a nadie, y si habla el interesado, se le comprende con muchos apuros; aunque luego, a fuerza de práctica, se logre acortar distancias.

Los adversarios del Esperanto quieren situar al Idioma Internacional en el mismo plano, arguyendo que un sueco hablará un esperanto distinto de un griego, cosa esta que, para un lego en la materia, no dejará de tener cierta lógica. El Dr. Zamenhof, que ya vivió en tal ambiente, dió al Esperanto un tipo de pronunciación y flexibilidad, al alcance de todos los humanos. En todos nuestros Congresos, se viene observando que el esperanto, hablado por un japonés o por un estoniano, es perfectamente seguido en conversación por todos los asistentes. Pero... aún hay más. Quien escribe estas líneas, se encontraba por casualidad en Viena, hace años, cuando allí tuvo lugar una reunión de esperantistas de todo el mundo. Era yo el único español que allí estaba y recuerdo con satisfacción lo grato que era poder hablar, en un plano de absoluta igualdad, con gente de la más variada procedencia, sin poder conocer, salvo rarísimas excepciones, la verdadera nacionalidad de los que estaban juntos, aunque pertenecían a más de 15 países distintos,

Esto constituye, por sí solo, un hecho real más fuerte que cuantas palabras se puedan decir, en pro o en contra, acerca del Esperanto. Para los esperantistas, mi narración no constituye nada nuevo, pero —por desgracia— para la mayoría de la gente, lo que cuenta es que el idioma que ha de regir a los demás es el que va acompañado de las armas más fuertes, más destructoras...

Creemos que se ha hablado y escrito ya mucho sobre la bondad de una segunda lengua para todos, pero en la que no creen —o no se atreven, o no quieren creer— los dirigentes del mundo.

¿Sería mucho pedir que se hiciera una prueba real, de la que bien podría salir la verdad?

Manuel RODRIGUEZ - Madrid

Lo que opina del Esperanto el Presidente de la Real Academia Española de la Lengua

D. Ramón Menéndez Pidal, Presidente de la Real Academia Española de la Lengua, Director de la Revista de Filología Española, y, en opinión de todos, la máxima autoridad sobre historia, lengua y literatura españolas, en afectuosa carta dirigida a nuestro amigo, el profesor J. Régulo Pérez, aceptando formar parte del Comité Internacional de Honor, para el año del Dr. Zamenhof, no ha vacilado en escribir: «Creo que se debe trabajar para que esa lengua, con el uso, se naturalice en la medida de lo posible». Naturalmente, nos alegramos de que nuestros esfuerzos merezcan esa opinión de la más alta autoridad lingüística de España.

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

TESORERIA

BALANCE EN 31 DE DICIEMBRE DE 1958

ENTRADAS

Cuotas atrasadas		655'—		
Cuotas del año 1958		29.415'—		
Donativos durante el año		5.389'—	35.459'—	
Congreso de Barcelona: entrega		380'—		
Congreso de Madrid: »		681'50		
Congreso de Castellón: »		900'—		
Matrículas y diplomas anteriores		105'—		
Matrículas y diplomas Castellón		180'—	2.246'50	37.705'50

SALIDAS

Cuota U. E. A. año 1958			1.062'—	
Material y gastos Secretaría		630'—		
Gastos de Tesorería	900'—			
Reintegros por reembolsos	504'—	396'—		
Correos y otros varios		1.154'65	2.180'65	
Edición del Boletín	18.705'—			
Sobres y gastos envío.	3.063'70	21.768'70		
Por venta de Boletines		829'—	20.939'70	
Compra tarjetas Congreso		1.004'60		
Por venta tarjetas.		336'—	638'60	
Gastos y material difusión		120'—		
Gastos por Servicios Federación		318'—		
Ajuar: compra máquina escribir		3.500'—	3.938'—	28.758'95

Superávit en el año 1958	8.946'55
Cobro factura carteles Madrid	2.600'—
Saldo en 31 de Diciembre de 1957	576'95
Saldo en 31 de Diciembre de 1958	12.123'50

Valencia, a 31 de Diciembre de 1958

El Tesorero, *Ernesto Guillem*

NOTA DE TESORERIA.—A la vista de este balance, con un superávit, por primera vez, de más de doce mil pesetas, está Tesorería quiere llamar la atención de todos los afiliados que ello se debe, en primer lugar, el sacrificio que representa la edición bimestral del Boletín. No obstante, en el presupuesto del año en curso hay que contar con un aumento del 25 % en el coste de impresión, así como la necesidad perentoria de renovar los tipos —cuyo desgaste es ya evidente— en lo cual tendremos que invertir más de la mitad de este superávit, que, sacrificando páginas del Boletín y gracias a una austera administración, podemos presentar satisfactoriamente en este balance. Por lo demás, insistimos en la oportunidad de cubrir, con las valiosas aportaciones voluntarias, el importe de la gratificación al auxiliar de Secretaría, así como incrementar los donativos para el Boletín, que de ahora en adelante aparecerá varias veces con doce páginas —como el presente número— en atención a la buena voluntad de nuestros amigos y como homenaje también a la solemnidad del año actual.

● AVISO IMPORTANTE: CAMBIO DE DOMICILIO SOCIAL ●

Advertimos a todos los afiliados, que en lo sucesivo, toda la correspondencia general: Secretaría, Administración, Boletín, Libro-Servo, etc., debe ser dirigida a la nueva dirección, donde se han centralizado los servicios, y que es la siguiente:

Federación Española de Esperanto: Calle Marqués de Caro, núm. 6, 2.ª - Valencia

NOTA.—Todo envío de dinero hágase a esta misma dirección, pero a nombre del Tesorero **D. Ernesto Guillem**

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Enero-Febrero 1959)

F. Abella - Barcelona	25	Ptas.
J. Devís - Valencia	25	»
J. Miró - Barcelona	50	»
S. Arizmendi - Eibar	20	»
C. Olalla - Bilbao	50	»
A. Criach - Sabadell	50	»
S. Gumá - Reus	25	»
F. Alcedo - Bilbao	20	»
R. Canet - Alicante	15	»
J. Isla - Puerto Santa María	20	»
J. Figueras - San Esteban de Bas.	75	»
N. Ullar - San Feliu de Codinas.	35	»
Katolika Centro - S. Feliu Codinas.	10	»
A. Escamilla - Pegalajar	10	»
J. Valls - Mataró	50	»
J. Vigatá - Cánovas	50	»
J. Aragay - Barcelona	25	»
M. Manteca - Pravia	50	»
E. Calvet - Tarragona	10	»
A. Jiménez - Tarragona	25	»
M. Cantalapiedra - Valladolid	10	»
L. Serrano - Osorno	10	»
W. Sonderegger - Suiza	10	»
V. Martín - Valencia	8	»
J. Frugoni - Telde	25	»
V. Ortiz - Pamplona	50	»
Centro Excursionista Puigcastellar	10	»
J. Salvá - Caldas de Estrach	25	»
A. Salete - Zaragoza	10	»
A. Pastor - Bilbao	120	»
C. Berghanel - Barcelona	20	»
E. Lunate - Baracaldo	10	»
J. Guio - Zaragoza	10	»
M. Fernández - El Ferrol	20	»
M. Elezcano - Bilbao	10	»
E. Larrauy - Bilbao	25	»
T. Apraiz - Bilbao	25	»
C. Gutiérrez - Bilbao	25	»
R. Palacios - Bilbao	25	»
V. Rebollo - Barcelona	50	»
V. Monsalve - Madrid	20	»
F. Enfedaque - Madrid	20	»
A. Bez - Italia	50	»
R. Molera - Moyá	50	»
J. Anguita - Jaén	10	»
F. Santacruz - Barcelona	10	»
H. Bakker - Holanda	25	»
F. García - Cádiz	10	»
A. Bohigas - Barcelona	25	»
P. Moreno - Madrid	50	»
E. Wolf - Santa Cruz Tenerife	10	»
Instituto E. - Barcelona	200	»
T. Elizondo - Trucios	25	»
J. Rodríguez - Madrid	25	»
R. Gisbert - Barcelona	25	»
E. Pérez - Valencia	25	»
J. Perogordo - Madrid	100	»
R. Cortijo - Lérida	50	»
F. de la Torre - Baena	50	»
F. García - Badalona	50	»
V. Fernández - Barcelona	10	»
A. Ballestín - Zaragoza	10	»
J. Oliveras - Barcelona	25	»
A. Costa - San Mateo	5	»
S. Ortega - Mahón	25	»
Total	**2.053**	**Ptas.**

¡Esta cifra, jamás lograda en una sola lista, es el mejor augurio para nuestro gran Año!

ĈU POLIGLOTO ESTAS POLILINGVA SINJORO?

Poligloto ne estas kunmetita, sed simpla vorto en Esperanto, kiel *aŭtomobilo*, ĉar ne ekzistas en nia lingvo radiko aŭ prefikso *poli*, nek *aŭto*, malgraŭ la mallongigo de *aŭtomobilo: aŭto*, kaj la neoficiala *Polio;* tial ne estas akcepteblaj *aŭtomovilo* kaj *polilingva*. Esperantaj kunmetitaj vortoj estas, ekz., *plurlingvulo, memmovulo, sinmovilo:* ulo scianta plurajn lingvojn, ilo kiu mem mov(iĝ)as, ilo kiu sin movas — *pola gloto* ja tre diferencas de *poligloto!*

Iu jam uzis la vorton *monolingva*. Eĉ en latinidaj lingvoj, ekz. en hispana, ne estas akceptebla la kunmeto: *monolingüe*, oni devas uzi *unulingüe*, ĉar en *monolingüe* unu elemento estas greka kaj la alia, latina. Korektaj hispanaj vortoj samsencaj estas: *poligloto* kaj *plurilingüe*, kiel en Esperanto: *poligloto* kaj *plurlingvulo*.

Do, ni kunmetu vortojn en Esperanto nur per elementoj memstaraj en nia lingvo: *monoŝajna* metalaĵo: metalaĵo kiu ŝajnas mono, monero; *poloŝajna* sinjoro: sinjoro kiu ŝajnas polo. *Polo* en Esperanto ne havas la sencon de *pluro*, kaj neniel rilatas semantike al *mono*.

DELFI DALMAU

ANTAŬEN!

Ĉar nuntempe ĉio urĝas, urĝe ni devas esti veraj samideanoj, veraj esperantistoj. La sekvantajn liniojn rekte mi adresas al miaj amikoj loĝantaj en Alicante, sed ili povas esti utilaj por la samideanoj el aliaj urboj, Ni ĉiuj opinias, ke Esperanto estas tre necesa; tamen, ni ĉiuj devas konfesi sincere, ke ni povus helpi pli efike nian Movadon, ĉar vere tro malmulte ni laboras. Esperanto devas *vivi* en nia menso, kiel ideala koncepto, tre bela kaj bona, kvankam la entuziasmo de kelkaj verdsteluloj suferas je anemio, pro manko de io, kio vigligas la entuziasmon: la verda vitamino!

Sen grupa vivo, sen korespondado, sen literaturo, neniam ni povos vivi. Ni bezonas unuigi niajn fortojn por esti utilaj al nia Movado. Alicante estas bonega restadejo, dum somero kaj vintro, pro la milda temperaturo, kiu logas eksterlandajn esperantistojn, dum la daŭro de la tuta jaro.

Estus tre bedaŭrinde, ke ni ne povus progresi pli. Do, ni ne prokrastu plu! Nia grupo devas baldaŭ stariĝi kaj kunveni. Ni havas la moralan devon, en la Zamenhofjaro, kontribui en taŭga proporcio al la tiucela penado de la hispana esperantismo!

Rodolfo CANET (Alicante)

INSTRUADO DE ESPERANTO AL HISPANOJ

MALFACILAĴOJ EN LA FONETIKO KAŬZE DE DIALEKTA PRONONCO DE LA GEPATRA LINGVO

Studo de Dario Rodríguez – Madrido

Ĉi tiu artikolo, kiun, pro ĝia intereso, ĉi-sube ni represas, aperis unue en la bulteno de la Madrída Esperanto-Klubo

La korekta prononco de Esperanto kaj de la gepatra lingvo estas unu el miaj plej ŝatataj temoj. Tial, kiam unuafoje mi klarigis kurson de la Internacia Lingvo, mia unua okupo estis detale klarigi la fonetikon de Esperanto.

Baldaŭ mi konstatis, ke, almenaŭ por la kastila (*) lingvo, la komparo de la Esperantaj sonoj, kun tiuj de la gepatra lingvo, povas krei tre gravajn erarojn. Kial? Ĉar preskaŭ ĉiu *natura* lingvo posedas la t. n. dialektojn, kiuj diferenciĝas de la pura aŭ centra literatura lingvo, precipe pro malsameco en la prononco.

Kio estas lingvo, kaj kio estas dialekto? Miaopinie, lingvo, kiel diras plej multaj gramatikistoj, estas la parolmaniero, vortaro kaj frazaro de popolo. Tamen, tio ne rajtigas nin kvalifiki kiel dialektojn la ceterajn lingvojn parolatajn en iu nacio, kiuj ne estas la centra aŭ plej multe uzata. Se en iu ajn nacio oni parolas plurajn lingvojn, kaj ĉiu el ili posedas propran gramatikon, apartan vortaron kaj literaturon, ĉiu el ili estas vera kaj efektiva LINGVO. Sed ofte, tiuj lingvoj siavice, havas brancôjn: fonetikajn diferencojn, kaj foje eĉ etajn vortarajn diferencojn, en la diversaj partoj de la teritorio en kiuj estas parolata la koncerna lingvo. Tiuj brancôj, apenaŭ diferencaj de la ĉefa trunko, estas la DIALEKTOJ. Ne konfuzu dialekton kun regionaj plenformitaj lingvoj!

Poste mi analizos la malfacilaĵojn, en la instruado de Esperantaj sonoj, per komparo kun kastilaj sonoj, kaŭze de tio, ke ofte la kastilaj sonoj ne estas unuecaj por ĉiu litero, pro dialektaj diferencoj, kiel ekzemple okazas pri la Esperanta J, kiu ĝuste koincidas kun la sono de Y en purega kastila lingvo, sed ne kun tiu sama sono Y, en diversaj kastilaj dialektoj: *andaluzia, ekstremadura, madrida, toleda.*

Sed, antaŭe, permesu al mi memorigi pri la konsisto de la hispana lingvaro, tra la tuta nacia ŝtata teritorio: En nia lando ekzistas efektive kvar lingvoj, kiuj estas jenaj, laŭ alfabeta ordo: baska, galega, kastila kaj kataluna. La baska havas, kiel ĉefan dialekton la centran aŭ tiun de la provinco Guipuzcoa. Pri la divido de la galega (proksime parenca al la portugala) mi povas nenion diri, ĉar tion mi ne konas. La kastila, oficiala aŭ t. n. hispana lingvo, havas sian plej puran parolon en la provincoj Valladolid kaj Burgos, solaj teritorioj, kie la admirinda beleco kaj riĉeco de la tutlanda lingvo pompas per ĉarmaj frazkonstruo kaj prononco. En ĉiuj aliaj teritorioj, la kastila prezentas dialektajn formojn: En Nova Kastilio —eĉ mem en Madrido!— en Andaluzio, Aragono, Murcio, Ekstremaduro, Kanaria Insularo k. t. p.

Ankaŭ, en la regionoj kun propra aparta lingvo, kiam oni buŝe uzas la kastilan, oni parolas ĝin sufiĉe diference al la natura parolmaniero de Burgos aŭ Valladolid, pro enmiksiĝo de fonetikaj elementoj de la propra regiona lingvo. Fine, en ĉi tiu rapida skizo pri la hispana lingvaro, estu dirite, ke la kataluna lingvo havas, kiel ĉefajn brancôjn, la orientan, en Barcelono kaj orienta Katalunio, kaj la okcidentan, en Valencio (ne ja nur en la urbo, sed en tuta samnoma regiono, kun tri provincoj) kaj en okcidenta Katalunio, krom la baleara formo, en la belega mediteranea insularo, kies ĉefurbo estas Maljorko. Kiel oni povis rimarki, la lingva panoramo de Hispanio estas tre varia, kio kaŭzas multajn malfacilaĵojn, por la instruado de fonetiko de alia lingvo per la kompara sistemo. Mi ne intencas studi la instruadon de la Esperantaj sonoj C, Ĝ, H, Ĵ, Ŝ, V, Z, kiuj ne ekzistas en la kastila lingvo, almenaŭ en ties pura alparolo. Sed, kompense mi deziras amplekse pritrakti la instruadon de Ĉ, Ĥ, J, (egalaj al kastilaj CH, J kaj Y, respektive) kiuj prezentas problemojn, se la lernantoj ne devenas de la jam aluditaj kastilaj provincoj Valladolid-Burgos.

Ĉiam mi konsideris nesufiĉa tiun klarigon, aperintan en la plej multaj Esperantaj gramatikoj de nia lando, pri la cititaj konsonantoj. Se oni diras, tro supraĵe: Ĉ esperanta = CH kastila, oni forgesas, ke, laŭ la sudhispana parolmaniero, la CH kastila estas preskaŭ la Ŝ

(*) Ĝi estas la ŝtata oficiala lingvo, internacie konata kiel la hispana lingvo, ankaŭ parolata en Suda Ameriko-

esperanta, CH franca aŭ SH angla. Kiam oni diras: Ĥ esperanta = J kastila, oni ankaŭ forgesas, ke, en Andaluzio kaj Ekstremaduro, tiu J kastila estas nature preskaŭ samsona al H esperanta, germana kaj skota. Kiam oni diras: J esperanta = Y kastila, tiam... venas katastrofo, ĉar tiu Y estas unu el la plej diverse prononcataj literoj el la kastila alfabeto. La litero Y (kiu krome estas aparta vorteto: la konjunkcio *kaj)* devas esti, laŭ pura kastila lingvo, egala al mallonga «i». Sed, ĝia sono varias ofte, atingante preskaŭ tiun de la esperanta Ĵ.

Kiel dirite, la ekvivalento de Ĉ, en kastila lingvo, estas CH. En kataluna kaj baska, tiu sono estas reprezentata kiel TX, aŭ sole nur per X. Precipe, en suda Hispanio, oni kutime prononcas la CH tro malforte, kvazaŭ la esperanta Ŝ. Por korekte ĝin prononci, oni devas unue apogi la pinton de la lango kontraŭ la antaŭa parto de la palato, super la dentoj, kvazaŭ por elparoli D aŭ T; poste, oni daŭrigas la prononcon de CH. Sudhispanoj, kiuj prononcas «chocolate», kiel «ŝokolate», imagu, ekzemple, ke ili devas prononci la vorton «tchokolate», ĉar tiu kombino TCH, laŭ sudhispana maniero, koincidas kun la korekta elparolo de Ĉ.

La sono de Ĥ, en la romanida familio, ekzistas nur en kastila lingvo. Ankaŭ ne en ĉiuj aliaj nialandaj: baska, galega kaj kataluna. Sed, en kelkaj kastillingvaj regionoj, la konsonanto J — ekvivalento de Ĥ — kutime estas prononcata malforte, kiel esperanta H. Oni devas prononci ĝin pli akre, proksimigante la malantaŭan parton de la lango, kiel eble plej multe, al la funda malantaŭa parto de la palato, kvazaŭ por gargari.

—

La korekta elparolo helpas altgrade la komprenon de la lingvo. Estas tre granda diferenco, inter parolado aŭ konversacio, sintakse kaj morfologie korekta, sed fonetike malperfekta, kun alia klare kaj korekte prononcata. Ofte, mi aŭdis bonegajn Esperanto-paroladojn de kompetentaj samideanoj, tamen preskaŭ nekompreneblaj pro fonetika malklareco. Por kastillingvanoj, kun dialekta prononco, estus bone sin ekzerci ĝis plej klara diferencigo de vortoj, kiel: caro - ĉaro, ŝelo - ĉelo, horo - ĥoro, juro - ĵuro, kaĝo - kajo, justa - ĝusta, k. t. p. laŭ pluraj similaj vorto-paroj.

NENIO PLI UTILA OL ESPERANTO

Estas certe, ke mi laboris iomete dum nia XIX[a] Kongreso. La sekretario kaj mi perdis, proksimume, po kvin aŭ ses kilogramojn, kaj S-ro Hernandez, komisiito por la loĝejoj... mi supozis, ke li mortos post la fino de sia laboro; sed, eble, li estas tre forta, kaj ni povas gratuli nin, vidante, ke li ankoraŭ bonfartas kaj estas preta por daŭri laborante. Mi ekskribis, ke mi laboris iomete dum nia kongreso. Poste, mi ankoraŭ estis devigata ampleksi mian laboradon. Mi serĉis la adresojn de ĉiuj kongresanoj; mi skribis iliajn adresojn; mi algluis la koncernajn --kaj sufiĉajn-- poŝtmarkojn, kaj mi disdonis la broŝurojn eldonitajn de la Firmo «Segarra».

Nu, bone. Mi laboris iomete; mi elspezis iometete, kaj nun mi estas konvinkita, ke «nenio pli utila ol Esperanto».

Ĉu vi scias kiom da leteroj, poŝtkartoj kaj gratuloj mi ricevis? Ĉu vi povas supozi kiom da amikecaj vortoj estis skribitaj por mi? Oni aniĝis, ĉirkaŭ mi, vera granda fratecanaro. Mi vere dankas tiajn agrablajn vortojn, kaj mi dezirus fari plej multe kiel eble, por tiaj amikoj; aŭ, pli bone, fratoj.

Ankoraŭ, antaŭ nelonge, bona kaj serioza Pastro, parolante kun mi pri Esperanto, diris: «Laŭ onidiro, Esperanto estas profitata por...» Mi ne atendis la finon kaj diris: «Jes, Esperanto, tial ke li estas tiel utila kaj simpla; tial, ke oni povas lerni la gramatikon en unu monato, kaj, poste, legi kaj skribi, per la helpo de malgranda vortaro, kaj baldaŭ interparoli kun iu ajn, estas ja profitata de ĉiuj. Ĉu oni povas malpermesi ke estu farata, aŭ farota, propagandon per angla, franca, aŭ germana lingvo? Do: Kiel eviti ke ĉiuj uzu la plej simplan, utilan kaj belan lingvon?

«Nenio pli utila ol Esperanto!»

Kaj, krome, ĝi estas grava ilo por atingi amikojn, fratojn, kaj, super ĉio, la pacon, Dian pacon!

A. JIMENEZ MORA-Tarragona

Okaze de la Zamenhof-Jaro, aliĝu kiel eble plej multaj al Universala Esperanto-Asocio. Tiel nia grava Asocio povos montri antaŭ la mondo la viglecon de nia nobla idealo. Jarkotizoj:

Membro kun Jarlibro.	=	90	pes.
Membro-Abonanto . .	=	180	»
Membro-Subtenanto. .	=	270	»

Ne forgesu ke UNUECO ESTAS FORTO!

Hispana Ĉefdelegito **RAMON MOLERA**
Strato Hospital, 13 - Moyá (Barcelona)

JUNULARA RUBRIKO

Ĉi tiu rubriko estos de nun kvazaŭ publika tribuno, kie la junaj samideanoj povos deklari siajn dezirojn kaj prezenti siajn laborojn. Ĉio, koncerne ĉi tiun fakon, estu adresata al la estro de la Junulara Sekcio: S-ro S. Aragay - Sans, 292 — Barcelona

NIA MEMBRARO

Ĝis nun, nia junulara sekcio konsistas el sesdek (60) membroj. Tiel rimarkinda nombro, kiel agrabla realo, povas esti konsiderata bonsukcesa. Pro tio, la estraro deziras doni al ĉiuj membroj pli precizajn ciferojn. Tio montros nian forton al ni, por konsekvence kaj oportune agi.

Nia nuna membraro, dividiĝas jene:

Infanoj, ĝis 15 jaroj	17
Gejunuloj, ĝis 25 jaroj ...	33
Abonantoj al HEJS-bulteno .	7
Membroj je aĝo ne difinita.	3
Entute......	60

Unuavide, surprizas la intereso vekita ĉe la infanoj. La leganto mem povas tion konstati. Vere, tiu intereso estas promesplena, ĉar la infanoj konsistigas la estontan fundamenton de nia Movado. Profitante ĉi-okazon, ni ege rekomendas la starigon de kursoj en nia sekcio. Tiuj, kiuj preferas la kursojn per korespondado, povas rekte sin turni al la gvidanto de tiu fako: S-ro R. Molera, str. Forn, 19, MOYÁ (Barcelona).

NOTO.—Oni petas al ĉiuj, kiuj aliĝis antaŭe al HEF, ke ili bonvolu sciigi al la sekretario de H. E. J. S. ĉu ili jam sendis la kotizon al la Federacio. *La Estraro.*

KURAĜA STUDENTO

Iam, revema kaj bonkora junulo entreprenis tre malfacilan taskon, nome: la kreadon de internacia lingvo.

Tiu noblega idealo postulis de li konstantan laboradon; sed lia sindonema persisto estis tiel granda, ke fine li atingis sian celon. Ĉu vi divenas pri kiu mi parolas, kara leganto? Sendube pri la fervora studento kaj obeema filo L. Ludoviko Zamenhof, al kiu la homaro ŝuldas eternan dankon. Tial, okaze de la Zamenhof-Jaro, mi volas, honore al lia memoro, citi ĉi tie la lastan versaĵon de lia belega poemo «La Vojo», kiu trafe karakterizas lian elstaran homan personecon:

«Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,
Jen estas la signoj, per kies potenco,
Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro».

Akorde kun ĝia instrua senco, streĉe ni laboru por la sukceso de nia komuna celo.

Tutmonda gejunularo, ke nia Esperanta agado estu inda je li! FERVORULO

HISPANA KRONIKO

HONORE AL D-RO ZAMENHOF.— Laŭ privataj informoj, placo de Tarrasa havos la nomon de nia Majstro, ankaŭ en Moyá; krome, en Sabadell kaj Villafranca del Panadés, la tiucelaj demarŝoj glate iras. Kion oni scias pri similaj klopodoj en aliaj hispanaj urboj? Estu honora zorgo nia sukcesi en tiu entrepreno!

SUKCESOJ EN VALLADOLID. — Nia fervora S-ano M. Cantalapiedra, sekve de prelego, tuj sukcesis, ke la urba sekcio de PAX CHRISTI organizu kurson de Esperanto en «Círculo de Obreros y Empleados«. Aliĝis preskaŭ 150 lernantoj --inter ili: advokatoj, pastroj, oficiroj, instruistoj, flegistinoj k. t. p. Neniam antaŭe, en Kastilio, okazis tiel brila komenco de kurso, de kiu ni rajtas esperi multon. Antaŭen!

GIJON NE STAGNAS.—Nia Grupo en «Ateneo Jovellanos» organizis ekspozicion, kiu daŭris 15 tagojn, kaj malfermis kurson kun ĉeesto de 25 virinoj kaj 40 viroj. Ĉar tiu Ateneo estas grava societo kun pli ol 3000 membroj, ni atendas bonan rikolton.

ANKAŬ EN PONTEVEDRA.—Dank' al la klopodoj de nia kompetenta S-ano Antonio Alonso Núñez, en la salonoj de «Casino Mercantil e Industrial» estis bonega Esp ranto --Ekspozicio kun aparta fako por la afiŝoj de UNESCO en nia lingvo. Ĉi tiu elmontro de nia forto vekis grandan miron en la kulturaj medioj de tiu galega urbo.

MALAGA, KIEL MAGNETA CENTRO, ALTIRE NIN VOKAS JAM!

La Organiza Komitato de la XXa Hispana Kongreso de Esperanto daŭre laboras, por la plej kontentiga disvolviĝo de nia ĉi-jara renkontiĝo. Kiel dirite, «Círculo Mercantil», la plej grava kultura Societo en la bela andaluza urbo, prenis sur sin la taskon kaj la honoron fari ĉion eblan, por la brila okazigo de la Kongreso. Tio estas garantio, ne nur por la Kongreso mem, sed ankaŭ por plena turisma ĝuado, en unu el la plej ravaj regionoj de nia lando. Efektive, Málaga estas nuntempe unu el la plej vigleprogresemaj hispanaj urboj, ĉar tie troviĝas la ĉefaj atingaĵoj de la moderna disvolviĝo de la vivo. Neniu devas forgesi, ke, en ĉiuj anguloj de la urbo, kaj, ĉefe, en la apudaĵoj, estas abunde travebla, tio, kion serĉas avide la vizitantoj de Andaluzio: lumon, kolorigan sunon, tropikan grundon, bluan kaj sorĉan maron kaj —en ĉiu momento— tipajn vestaĵojn, lokajn kutimojn, popolajn dancojn, gajan naturan humoron, elvokigan muzikon; unuvorte: poezion!

Neniu devas dubi pri la penoj, kiujn «Círculo Mercantil» faros por agrabligi la restadon de niaj geamikoj. Ni konscias pri la aranĝo kaj trafa disvolviĝo de la programo, fare de personoj, kiuj kutimas plenumi tiun taskon. Se hispanoj trovos en la kadro de la kongreso agrablon kaj kontentigon, eksterlandanoj —tute certe!— miros pri la neatenditaj ĝuoj; kaj poste, en siaj hejmoj, ili rememoros dum longaj jaroj la plezurplenajn horojn tie pasigitajn. Gaja heroldo estas la programo, kiun ni sendos baldaŭ al ĉiuj HEF-anoj.

Kaj, pri la temperaturo, ho... trankviliĝu! Ĉi-sube, ni transskribas pecon de konversacio de D-ro Herrero kun persono, kiu, irante al Málaga ĉiusomere, estas tute ne plendema pri ĝi... Por esperantistoj, kiuj nur celas la efektivigon de konstrua kunveno, ni scias, ke ili trovos adekvatan lokon kaj okazon por digne celebri la Zamenhof-Jaron.

Foje, ni legis en ĵurnalo jenan anoncon de meblovendejo:

«Vi serĉu nur la fianĉinon, ni prezentos la ceteron!» Nu, jen ni diras al vi:

«Vi subskribu nur la aliĝilon, ni zorgos pri la cetero, por via distro kaj plezuro!»

Do, nepre venu al Málaga, ĉarma scenejo por la Kongreso de la Zamenhof-Jaro!

FRAGMENTO DE UNA CONVERSACION

—...Como en verano, el calor aprieta en Nador, nos pasamos dos o tres meses en Málaga, en donde me he comprado una casa.

—Hombre, a propósito: ¿Qué tal de calor en Málaga?

—Pues, ya te digo, yo me refugio allí, y lo pasamos estupendamente bien: playa, pinadas, montaña, magníficas excursiones...

—¿Será algo así como el calor de Valencia?

—Sí, pero más suave y soportable aún.

—Es que algunos amigos han insinuado que se pasaba mal.

—Puedes, pues, tranquilizarles. Yo voy allí, precisamente, para pasarlo bien.

(Conversación mantenida entre el Doctor Herrero y un pariente suyo, residente en Marruecos)

XX CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO — 18 - 23 AGOSTO MALAGA

Habiendo ya quedado fijada la fecha, dentro de pocos días enviaremos amplios detalles con la hoja de inscripción. De momento queremos anticipar que el Círculo Mercantil (calle de Larios, 3) queda constituído en Secretaría del Congreso, de cuyo programa, he aquí lo más sobresaliente:

Concierto de Música española en el Conservatorio. - Misa en el Santuario de Ntra. Sra. de la Victoria. - Solemne apertura del Congreso en el Ayuntamiento. - Vino de honor y fiesta folklórica en la Alcazaba. - Visitas culturales y a la finca «La Concepción». - Excursión a Ronda. - Excursión a la Costa del Sol, hasta Marbella. - Visita a bodegas famosas. - Banquete oficial en la Hostería de Gibralfaro. - Solemne Clausura del Congreso en el Ayuntamiento.

¿No son estos datos más que suficientes para animar a los menos animosos?

El año jubilar del Dr. Zamenhof se celebrará en España, entre otros acontecimientos, con un Congreso INOLVIDABLE. Dadas las circunstancias y el extraordinario programa, es de esperar que ningún esperantista español deje de acudir a la jubilosa llamada, que se le hace ahora ya, para tomar parte en las tareas constructivas, que han de fortalecer la consistencia del esperantismo español: discusiones, conferencias, exámenes, propaganda radiofónica, etc. que se une al programa de unos atractivos turísticos, muy difícilmente superables.

Tengan todos la absoluta seguridad, de que el Congreso ofrecerá fiestas y recreos, que los simples turistas no pueden alcanzar, sino a costa de considerables dispendios. Así pues...

ANTAŬ LA 500-JARA JUBILEO PRI LA MORTO DE AUSIAS MARCH (*)

LA KLASIKA VALENCIA POETO, PLEJ ELSTARA EN LA LITERATURO DE LA KATALUNA LINGVO

En katalunaj kaj valenciaj literaturaj rondoj —ankaŭ en la Universitato de Valencio— oni jus solene celebris per diversaj aranĝoj, la kvincentjaran datrevenon pri la morto de tiu fama mezepoka poeto. Kiel pli ĝenerala omaĝo, en universala amplekso, por la tutmonda samideanaro, ni prezentas ĉi-sube kelkajn fragmentojn, kune kun aliaj niaj, kiuj, pri Ausias March, aperis en la «Kataluna Antologio», plej valora verko, ĝis nun eldonita, en Esperanto pri la kataluna lingvo. — REDAKCIO.

En la jaro 1393, naskiĝis en Gandia la poeto Ausias March. Plej aĝa filo el branĉo de antikva kataluna familio, transplantita en Valencio, li estis edukata dum sia juneco en la devoj kavalirecaj, en la amo al la literaturo kaj en la studado de la filozofio. Li estis militkamarado de alia fama poeto, Jordi de Sant Jordi, granda konanto de Petrarca, kaj de Andreu Febrer, kiu, en 1428, estis finonta sian tradukon de Dante. Kvankam kritikistoj tro serĉis la paralelismon inter Ausias March kaj Petrarca, nenio fundamenta estas komuna ĉe ili, krom tio, kion unu kaj alia heredis de la trobadoroj, ĉar ili ambaŭ apartenas al la provencala skolo: Petrarca, kiel renesanca pagano, kaj Ausias March, kiel skolastika kristano. Nia poeto, dufoje edziĝinta kaj tre ofte sklavo de la «freneza amo», kantis per filozofiaj terminoj al «Na (**) Teresa», lia ideala amatino, la homan amon, ne nur korpan, sed ankaŭ ne platonan. Liaj poemoj situas tiel malproksimaj de la erotikeco de la antikvaj trobadoroj, kiel lia Teresa diferenciĝas de tiu anĝelo-virino de la italoj.

Ĉiam, kiam la ideoj de Ausias March estas konkretigitaj en bildoj, ili enhavas la forton de danteca pentraĵo. Sed, ĝenerale, li movas sin en la kampo de la abstrakto, kio faras lin malklara por moderna leganto, kiu ne konatiĝis kun la skolastiko. Se li estus uzinta pli la plastikan fantazion, ni povus trafe diri, ke la verkaro de Ausias March estas al la psikologio, kio al la teologio estas la *Commedia* de Alighieri. Ausias March, plene eliĝante el la provencalaj formoj, kiuj ankoraŭ pezadis sur liaj samtempuloj, estas la ĉefo de la lasta skolo de nia klasika poezio, jam nete kataluna. Lia vervo atingis superajn perfektecojn kaj eĉ rimarkinde influis sur elstaraj postaj klasikuloj de la hispana lingvo. Mortis la Poeto, la 3an de Marto 1459, en Valencio, en kies katedralo kuŝas ankoraŭ nun lia korpo; sed ne estis necesa la morto, por pligrandigi la famon de lia nomo, pri kies gloro estis atestanto, jam dum lia vivo, la Markizo de Santillana.

Nu, se oni aldonas, ke, krom eminenta poeto, li estis belaspekta viro, aroganta kavaliro kaj plenpova nobelo, ne ŝajnas tro fanfarona lia ŝatata sinprezento:

Jo só aquest que-m dich Ausias March:
Mi estas tiu, kiu nomiĝas Ausias March!...

Jen, kiel specimeno, la unuaj strofoj de unu el liaj admirindaj kantoj:

Fantasiant, Amor a mi descobre...

En mia pens' la Am' al mi malkovras
pri la sekret' al ĉiuj plenkaŝata,
kaj mia tag' por homoj estas nokto
kaj nutras min, kion ili ne manĝas.
Tiel, en Am' mia spirito vivas,
ke tute ĝi de l' korp' foriĝi ŝajnas;
mia dezir' ne trovas sin en homo,
krom en la hom', kiun ne regas karno.

Ne sentas karn' en mi l' ardan deziron
kaj la spirit' pri amaj ĝoj revas.
De l' blinda fajro, varmigo de l' amantoj,
ne estas tim' ke mi la ardon sentus.
Alia vol' ja mia volo estas,
kiam ĝi, vin amante, kontentiĝas:
ne havas ĝin pasiaj geamantoj,
pro troa varm' antaŭ la Am' ne indaj.

Se estus Am' io scia kaj saĝa,
kaj havus ĝi superregantan sceptron
—premi' kaj pun' de bonoj kaj malbonoj—
mi estus ja fenikso ĉe l' plej bonaj.
Ĉar sola mi forlasis la miksaĵon
de malbelec' kaj beldeziroj kunaj.
Ne decas pun' al mi, je tentoj pura:
ilia kulp' en mi ja estas nula.

Kiel la lum' de l' mond' estis fiktiva
antaŭ la lum', por la Sanktuloj, Dia,
kaj, en malŝat' de l' vana monda gloro,
al pleja glor' posta ili aspiris,
tiel por mi ja estas malŝatinda
tiu dezir', post kiu Am' mortiĝas,
kaj amas mi dezirojn de l' spirito,
sen ia lac', kun daŭra multobliĝo.

El la katalunlingva originalo tradukis
† JAUME GRAU CASAS

(*) Elparolu: Mark.
(**) Respekta titolo tiutempa por altrangaj virinoj.

La vivo devas flui.
Akvo kvieta malkomponiĝas!
LAMARTINE

BONHUMORO PRI LA MONO

Juĝisto.—Laŭ atesto, vi ŝuldas mil pesetojn.
Akuzato.—Jes, tio estas vera.
Juĝisto. — Kial do vi ne pagas?
Akuzato.—Ĉar tiuokaze, tio ne estus vera.

—

—Ĉu mi povas konfidi al vi sekreton?
—Diru.
—Urĝe mi bezonas kvincent pesetojn!
—Nu, imagu, ke nenion vi konfidis al mi...

—

Orienta reĝo rajdis sur ĉevalo tra urbo. Subite, la besto furioze senbridiĝis, civitano, je risko de sia vivo, sukcesis kvietigi la ĉevalon. La reĝo demandis lin dankeme kian rekompencon li deziras ricevi: monon aŭ gravan postenon.

—Nenion el ambaŭ aferoj, sinjoro. Se vi volas ion donaci, skribu ordonon por ke ĉiu edzo, kiu timas sian edzinon, donu al mi unu piastron.

La reĝo kontentigis lian deziron.

Unu jaron poste, la civitano revenis en la palacon.

—Jen, pro via ordono, mi ricevis multe da mono, kaj mi portas al vi donacon.

—Kio ĝi estas? Demandis scivole la reĝo

—Belega junulino.

—Ŝŝ!... Parolu pli mallaŭte, ĉar la reĝino troviĝas en apuda ĉambro...

—Ĉu vere? Donu al mi unu piastron!

—

Bonfaranto. — Jen du pesetoj, sed ne elspezu ilin tuj en la unua drinkejo.

Almozulo.—Mi ja rimarkas, ke vi estas kompetenta, sinjoro, ĉar en la dua drinkejo de ĉi tiu strato, oni donas pli bonan vinon ol en la unua...

PRESKAŬ MIKROSKOPA LIBRO


En la ŝtata muzeo de Boston, la usona urbo, troviĝas, inter aliaj maloftaĵoj, la libro plej eta en la mondo. Ĝia amplekso estas pli reduktita ol ordinara poŝtmarko: Temas, tamen, pri kompleta volumo kun 464 paĝoj por la teksto de kvar el la plej elstaraj diskursoj de Abraham Lincoln.

Ĉu, en la historio de la homoj, oni vere konas la fundon?
El la fama taglibro de AMIEL

SFINKSA ANGULETO

LA PIEDIRANTO

Piediranto devas trairi, en kvar rektaj linioj, la naŭ punktojn ĉi-sube indikatajn. Nepra kondiĉo estas trairi ĉiun punkton nur unu fojon.



Kiamaniere li sukcesis fari tion?
Ĝusta solvo gajnos du poentojn ĝis 25. Aprilo.

SOLVO PRI LA PROBLEMO FRUE KAJ MALFRUE EN LA PASINTA NUMERO

La distanco estis de 60 kilometroj.

EL LA LETEROJ DE NIAJ KORESPONDANTOJ

«Laŭ invito de kultura societo, mi ĉeestis en filmo-parolado. D-ro Albrecht Beckh, kunlaboranto de Prof. Picard, paroladis pri la prezentata filmo «Mondo en la Profundo». Vorte kaj bilde, D-ro Beckh rakontis siajn aventurojn, kiel subakvisto kaj esploristo. Per sia submara filmilo, li kaptis belegajn bildojn en la Atlantiko kaj en la tropikaj maroj, el kies profundegaĵoj li prezentis multvalorajn trovaĵojn. La bildoj montris la naturan vivon de strangaj marbestoj. Mi tre miris, ke la fiŝoj ne timas la homojn, interne de la maro. Antaŭ la subakvisto, la fiŝoj ne fuĝis; kontraŭe, ili naĝis renkonte al li, kvazaŭ ili kredus, ke tie la homo ankaŭ estas fiŝo, sendanĝera fiŝo...

Ni vidis ankaŭ pereintajn ŝipojn, kies partojn subakvigisto esploris, ĉu li eblė ankoraŭ povos demunti ion uzeblan. Efektive, ni vidis, kiel subakvigisto per fera segilo detranĉis multvaloran ŝtalan radon. Longan ŝnuregon li fiksis al la uzeblaj objektoj, transportante ilin al la supraĵo».

ELISABETH SLEZAK
Essen - Stoppenberg (Germanio)

Kion dirus la eŭropaj liberstiluloj, se ili renkontus publikaĵon, en kiun sudaziano enplektus novismojn el sudaziaj lingvoj? Ili, kredeble, ekkonus la dangeron de la vojo, kiun ili antaŭmarŝis.
Meditinda demando de samideano F. Kraus, en artikolo de «Germana Esp. Revuo»

Tenemos el penoso deber de informar a los esperantistas españoles del fallecimiento del Dr. Roberto Maraury Barredo, en Málaga, el día 1 de Diciembre próximo pasado. El ilustre finado poseía varios títulos académicos y había ocupado altos cargos, entre los que destacaban el de la Dirección de las Aduanas de Marruecos y la representación de España en diversas conferencias internacionales, por ser un destacado técnico africanista.

Notable escritor y cultísimo esperantista, formó parte de la Comisión internacional encargada de confeccionar los vocabularios técnicos en Esperanto; a él se debe la extensa información, en la Enciclopedia Espasa, referente al idioma internacional.

Pero, por encima de todo, Maraury era un hombre de corazón generoso y abierto. En su mansión malagueña acogía calurosamente a los numerosos esperantistas españoles y extranjeros que a ella acudían, y que siempre recordarán al nobilísimo finado.

A sus desconsoladas viuda y hermana, también fervorosas esperantistas, enviamos el sentido pésame de la Federación, en nombre de todo el esperantismo español.

SECCIÓN ESPAÑOLA DEL MOVIMIENTO CATOLICO INTERNACIONAL «Pax Christi»

Secretariado de Esperanto

Las rutas internacionales Pax Christi se celebrarán este año en Alemania, del 25 de Julio al 4 de Agosto. La clausura tendrá lugar en Treveris (Renania). Los participantes deberán tener de 18 a 30 años. El tema será: «La aproximación de los hombres y sus culturas». Los jóvenes esperantistas de ambos sexos, que deseen participar, deben ya relacionarse con el Secretariado de Rutas, a cargo de D. Juan A. Pagés, Rosellón, 208, Barcelona, indicando que saben el Esperanto, al objeto de incluirles, si es posible, en un grupo al que asistan esperantistas de otros países. El plazo de inscripción terminará el día 1 de junio próximo.

También se proyecta en Barcelona, para la segunda quincena de Agosto, una reunión internacional de matrimonios. Los interesados pueden dirigirse a Pax Christi, grupo de Barcelona, a la dirección ya indicada del Sr. Pagés.

El Secretario de Esperanto,
JOSE GUZMAN

ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ!

Oni sciigas vin, ke ŝangiĝis la tuta Estraro de la Hispana Fako de Esperantistaj Fervojistoj, kies sidejo troviĝas nun en Barcelono, laŭ jenaj adresoj:

Sekretario: S-ro R. Giménez Feliu
str. Julián Romea, 9, 3.º 1.ª
Kasisto: S-ro J. Miró Giné
str. Rosendo Novas, 27, 1.º 1.ª

La jarkotizo estas 25 pesetoj. kun rajto al la dumonata internacia fervojista Bulteno

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (T. E. Ĵ. A.)

Invitas al aliĝo kaj utila kunlaboro ĉiujn kolegojn: ĵurnalistojn, redaktorojn. Jarkotizo: 1 dolaro al iu el la kasistoj:

S-ano André Ribot - 11, rue P. Vergues
Marmande (L. et G.) Francio
S-ano I. Keremidĉiev-Esperov
Bulv. Hr. Botev, 98 Sofia - II (Bulgario)

PREMIO AL S-ANO J. ANGLADA PRIOR

La Reĝa Akademio de Moralaj kaj Politikaj Sciencoj ĵus asignis valoran premion de dek-kvinmil pesetoj al S-ro J. Anglada Prior, eksvicprezidanto de nia Federacio, pro lia interesa memuaro pledanta por unu sola imposto sur la valoro de la grundo. En niaj rondoj estas konata lia kompetenteco pri ekonomio kaj financoj. Okaze de la ricevita rekompenco, lia nomo aperis en gravaj ĵurnaloj kun gratuloj, al kiuj ni ĝoje aldonas la niajn, nome de la hispana esperantistaro.

● ALVOKO ●

En la nomo de la Estraro de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, mi varmege alvokas ĉiujn gestudentojn kaj studentajn klubojn, konigi siajn adresoju al la sekretario de STELO, J. C. Wells, Trinity College, Cambridge (Britujo) aŭ al la landa peranto. Necesas, ke ĉiuj studentaj fortoj kunlaboru por progresigi la Internacian Lingvon en la Universitatoj, kio estas la nepra bazo por ĝia estonta enkonduko en la lernejojn kaj fina oficialiĝo! UNUECO estas FORTO!

Paul Ciliga, Prezidanto de STELO.

La internaciaj feriaj Esp-kursoj en La internacia Altlernejo de Helsingor (Danlando), okazos ankaŭ nunjare, 25/7 - 1/8, do tuj antaŭ la UK. en Varsovio. Rimarkinde estas, ke jam 27 jarojn sinsekve okazas ĉi tiu feria aranĝo. Multaj miloj da gesamideanoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la terglobo ĉeestis ilin kaj ĝuis agrablajn tagojn. S-ro Tib. Morariu, el Stokholmo, gvidos denove sian preparan kurson por Cseh-metodaj geinstruistoj, F-ino Ida Christensen, el Kopenhago, la konversacian kurson, kaj S-ro Sogard, el Aarhus, la daŭrigan. Krome faros prelegojn F-ino M. Noll, S-ro L. Friis, kaj aliaj.

Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS Ingemannsvej, 9 - Aabyhoj (Danlando)



UNITARISMO — REALIGITA HOMARANISMO. Kompilo kaj traduko el la angla lingvo de Rüdiger Eichholz. 60-paĝa broŝuro eldonita de «Esperanto Press» Onkville, Ontario (Kanado). Prezo: 0'75 dol.

Vere, la idealistaj kaj spiritaj temoj ĉiam trovis bonan akcepton en la gastama domo de la Esperantismo, kie, eĉ en okazo de plej funda diferenco de opinio, inter samideanoj, pri aparta punkto aŭ tuta enhavo de kiu ajn el tiuj temoj, regas kutime ekzemplodona toleremo kaj alta komprenemo, kio plene pruvas la aserton, ke Esperanto ligas la homojn ankaŭ en iliaj plej intimaj sentoj.

Sobre sed plaĉe eldonita de kanada presejo, ĉi tiu broŝuro celas diskonigi moralajn principojn, kiuj iel rilatas kun tiuj de la Homaranismo de D-ro Zamenhof, kvankam --laŭ diro de la kompilinto-- Unitarismo, deveninta de tute alia fonto, evoluis, per logika aplikado de siaj principoj, al pensado, kiu donas neŭtralan kadron kaj emociajn valorojn enestantajn en ĉiuj alte evoluintaj kredoj.

Koncizaj klarigoj --ja *klaraj* klarigoj!-- kun belaj metaforoj kaj trafaj difinoj ebligas agrable kompreni --eĉ al skeptikaj personoj-- la sencon de moderna pensmaniero pri spiritaj aferoj, kiuj feliĉe, ne dronas, sed percepteble sukcesas montri sin, kiel flosantaj saviloj, en la inundo de trivialismo, kiu ĉien nuntempe etendiĝas.

Konsciante pri tio, sed aktive agante samtempe por haltigi la lavangon, unitaranoj kuraĝas optimisme diri: «Ni kredas, ke la mondo, la vivo kaj la homo estas bonaj, kaj pro tio ni povas vivi ne malhelpate kaj evoluigi ĉiujn niajn fortojn».

Jen do noblanima opinio, kiu, se koincida kun jam konataj deklaroj, tamen estas en ĉi tiu oportuna broŝuro tre originale kaj tre konvinke prezentata.

La traduko de S-ro R. Eichholz estas modela, la lingvo fluas sen komplikaĵoj, kio efike kontribuas al facila kompreno de studindaj tezoj, kies ekkono estos surprizo por multaj, kiuj, opiniante, iom antaŭjuĝe, trovi en la aludita broŝuro tedajn cerbumaĵojn, tuj plezure malkovros freŝajn konceptojn, kiuj distras, instruas kaj vekas intereson al pli zorga esplorado en la mondo de la ideoj.

LUIS HERNANDEZ

NIA VIVO, broŝuro 20-paĝa eldonita de Esperanta Societo «Frateco», str. San Vicente de Paul, 1.°, Zaragoza (Hisp). Prezo: 10 ptoj. Eksterlande: 3 rpk.

Kun la celo rememorigi la 50-an jaron de ekzisto de la Klubo, niaj bonaj amikoj de la Societo «Frateco» en Zaragozo eldonis belan broŝuron kun la nomo »Nia Vivo», tio estas la titolo de tiu revueto esperantista, jam malaperinta, kiun antaŭlonge publikigis la menciita Societo. La broŝuro enhavas interesajn artikolojn, pri tiel grava evento, de samideanoj Marqueta, prezidanto de tiu Societo; Beckers, prezidanto de IKUE; Bartel, kunlaborinto de sinjoro Gastón pri la afero de la gastigado de aŭstraj infanoj, post la unua mondmilito; Lehner, unu el la tiamaj infanoj aŭstraj, gastoj en Zaragozo; Artigas, la sindona samideano, bedaŭrinde jam mortinta; Pastro Casanovas, amiko jam sufiĉe konata de la tuta hispana samideanaro, precipe de tiuj ĉeestintaj niajn naciajn kongresojn, pro liaj interesaj predikoj; Orós, honora prezidanto de «Frateco»; De la Puente, prezidanto de la Katolika Esperantista Hispana Asocio; Máñez, la pioniro de Esperanto en Cheste, kaj F-ino Emilia Gastón, filino de la forpasinta samideano Emilio Gastón, kunfondinto de «Frateco», samideano karmemora, kiu tiom ege laboradis por nia afero en Zaragozo.

Aperas ankaŭ en la broŝuro belaj poemetoj de S-ano Sancho Izquierdo, profesoro de la Zaragoza Universitato; Hilda Dresen, unu originala, kaj aliaj, tradukoj, el la fama estona poetino Maria Under; Kraus kaj Grabowski. Estas ankaŭ menciinda interesa priskriba raporto pri la festo aranĝita por celebri la Oran Jubileon, festo okazinta en grava restoracio de la urbo. Oni mencias en tiu raporto la ricevitajn salutojn: de profesoro D-ro Ivo Lapenna, sekretario de UEA; de D-ro Rafael Herrero, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio; kaj oni reproduktas ceterajn paroladojn faritajn en tiu jubilea festo. Sur la kovrilo aperas fotografaĵo de S-anoj Agustín Montagud, Rafael Benítez kaj Emilio Gastón, kunfondintoj de la Societo, antaŭ 50 jaroj.

La kompiladon, tipografian aranĝon kaj kovrilon tre lerte faris la redaktoro de nia BOLETIN, S-ano Luis Hernandez. Tial, li, same kiel la fervoraj organizantoj de la festo kaj eldonintoj de «Nia Vivo», meritas la dankon de la samideanaro.

JUAN BOSCH

VIVO SAMIDEANA

En Oslo, ĉefurbo de Norvegio, nia karega Pepita Criach, la hispanino, kiu antaŭ du jaroj edziniĝis kun la norvega S-ano Herbert de Caspary, naskis belan infanon, kies unua ekploro estis jam per Esperanto. Koran gratulon al la feliĉaj gepatroj pro la ĉarma ideto, denaska esperantisto, kiu certe fariĝos elstara pioniro de nia idealo

Kaŭze de tragika akcidento, pereis en Madrido la filo de nia tre bona kaj fervora S-ano Roberto Calvet, el la Valencia rondo. Nian plej sinceran kondolencon!

GRAJNOJ EN VENTO estas lerneja organizo tutmonda, kies rondoj trifoje en la jaro --Marto, Junio, Novembro-- eldonas en normigita komerca formato: 21 x 29'7 cm. 20 ekzemplerojn kun desegnaĵoj kaj tekstoj, libere verkitaj de gelernantoj. Tiuj 20 ekzempleroj estas *originaloj*, permane skribitaj de la infanoj mem, aŭ permaŝine multobligitaj. Plej ofte ili estas *kolorigitaj*.

GRAJNOJ EN VENTO disvastigas Esperanton ĉe la infanoj kaj, kun la infanoj, *kunlaboras al frateco kaj paco* en la mondo. Skribu al ni, ĉu vi estas preta kunlabori aŭ ĉu vi konsentas fariĝi gvidanto de nova rondo. Aldonu internacian respondkuponon! Adreso: Marcel Erbetta, rue des Pins, 66, *Bienne-Biel 7* (Svislando)

INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO

organo de la Societo por Internacia Lingvo, kies tasko estas science traktadi la problemon de internacia lingvo kaj aktivadi por akcepto de neŭtrala lingvo, progresigante tiel la internaciajn rilatojn.

Elstaraj Profesoroj estas ties Honoraj Korespondaj Membroj. Petu informojn al Societo por Internacia Lingvo
Mürwiker Strasse, 179-Flensburg **(Germanio)**

Mendu viajn stampilojn al
J. Montfort - Apartado 19003 - Barcelona
La pago okazos ĉe la ricevo per poŝto.

La bela revuo **NIA VIVO** eldonita de Grupo «Frateco» el Zaragozo ankoraŭ estas akirebla. *Enlande: 10 pesetoj. Eksterlande: 3 respondkuponoj.*
ESPERANTA SOCIETO «FRATECO»
San Vicente de Paul, 1.° - ZARAGOZA (Hispanio)

Deziras korespondi...

24-jara fraŭlo: S-ano Augustyn Korbiel kaj S-ano Zdristan Prybylski
Paczoltowice Czerna Chnanon (Pollando)

S-ano Aleksandr Hristov - Poŝtkesto, 5
Kjustendil (Bulgario).

S-anino Wierzejska Wienczyslawa
Al. Krasinskiego, 16 - Krakow (Pollando)

F-ino Jadwicza Prokopczuk
ul. Pradwicka, 8 - m 6 Krakow (Pollando)

F-ino Yuka Matuda, japana knabineto 13-jara, 41-402 Kitaku Siga-Star-House
Nagoya (Japanio)

S-ano Julio Cardenal, Padre Llauradó, 223 Tarrasa (Barcelona) Hispanio, deziras interŝanĝi nur poŝtmarkojn.

Malnova esperantisto deziras denove praktiki la lingvon, korespondante kun tutmondaj gesamideanoj, speciale el Japanio kaj Germanio.
Skribu al S-ro Antonio Castillo
Alfara de Carles (Tarragona) Hispanio

Deziras ricevi esperantaĵojn kaj skribaĵojn, por propagando de la lingvo:
S-ro Alfred Müller, Sonnenburgerstrasse, 56 I r. Berlin N58. (Germanio)

Kun la celo doni al la nova generacio oportunon por lerni Esperanton kun la terkulturo, oni jam petas kaj akceptas ĉiaspecan helpon, inkluzive per uzitaj poŝtmarkoj. Terkulturistoj kaj amatoroj pri bredado de plantoj kaj bestoj estas sincere petataj rilati kun S-ro
Carlos Geiser-Regiona Esperanto-Movado
Blumenau S. C. (Brazilo).

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA